# Trejnilo de Esperanta Leksiko

Kompilo kaj metodika prilaboro: Ryszard Rokicki

## TESTO 17

**Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

1. Por malsaĝulo bastono – por saĝulo ␣ ␣ c ␣ ␣ n ␣.
2. ␣ ␣ n ␣ r ␣ ne donas, kion stomako bezonas.
3. Malsaĝuloj kreskas mem, sen ␣ l ␣ g ␣ kaj sem'.
4. Pli bone estas ŝviti, ol ␣ r ␣ m ␣.
5. La sezono por kapti fiŝojn per ␣ ␣ r ␣ ␣ komenciĝas en aŭgusto kaj daŭras ĝis novembro.
6. Poluado de l' atmosfero per venenaj ␣ ␣ s ␣ ␣ el industrio, hejtiloj kaj, precipe, aŭtomobiloj kaj avioj kaŭzas tutmondan plivarmiĝon.
7. Membroj de nova E-grupo deziras ␣ ␣ r ␣ ␣ ␣ ␣ n ␣ ␣ kun E-kluboj kaj apartaj esperantistoj.
8. Kohl sukcesis formi kaj ␣v␣ ␣ ␣ la partion tute laŭ sia gusto, ĉar kun disdono kaj retiro de sia favoro al aliaj li ankaŭ disdonis aŭ retenis monon.
9. Tutmozis jam de kvin tagoj ne banis sin kaj ne vidis la rozan ␣ l ␣ ␣ ␣ kaj li devas ankoraŭ plenumi du marŝojn.
10. La tabulo estis volvita en kanaba sako, sed ĝi delonge jam putriĝis kaj ␣ ␣ r ␣ ĝ ␣ ␣.

**Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

1. Ne malmulte da homoj esprimas zorgon pri la eventualaj riskoj de la gentekniko al la medio kaj al nia sano, kiuj fakte estis la temo de v␣ g ␣ ␣ debato lastatempe.
2. Multaj gepatroj de s ␣ ␣ d ␣ ␣ infanoj kritikas la gestlingvon.
3. La nova registaro rikoltis malaprobon de la forsta i ␣ d ␣ ␣ ␣ r ␣ ␣, kiam ĝi decidis ne plu ekspluati la indiĝenajn arbarojn ĉe la okcidenta marbordo de Sudinsulo.
4. Antaŭ la elaŭtiĝo ĉiam rigardu teren, ĉar s ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ t ␣ povas esti sunbananta ĝuste tie, kien vi volas meti la piedon.
5. El la aŭtora enkonduko oni ekscias, ke la unuaj kvar ĉ ␣ ␣ ␣ ␣ r ␣ ␣ koncernas la lingvon Esperanto ĝenerale, sen speciala atento al esprimrimedoj.
6. La averaĝa prezo de litovaj f ␣ ␣ ␣ ␣ ĝ ␣ ␣ vere estas preskaŭ duone malpli granda ol tiu de la italaj aŭ francaj.
7. Mi ne ĉiam atentas pri recenza parto de la revuo, sed ĉi-foje mi tralegis ĝin plene, ĉar mi volis kompari la s ␣ ␣ l ␣ ␣ ␣.
8. Malgraŭ mia foje grava kaj akra kritiko, mi volas tamen r ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ n ␣ ␣ ***La Novan Plenan Ilustritan Vortaron*** al ĉiuj lernantoj kaj uzantoj de la Internacia Lingvo.
9. La ŝipo sin mallevadis kiel cigno inter la altaj o␣ ␣ ␣ ␣ kaj levadis sin ree sur la akvajn montojn.
10. La kroataj organizantoj aranĝas ĉiujare foto-konkurson kun valoraj p ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ kaj someran kampadejon meze de aŭgusto en Zadar.

**Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| |
|---|
| ŝnur', regul', rilat', trov', flag', riproĉ', tas', metal', publik', sign' |

1. Rostita platbeka anaso, pensis Sapulo, estus proksimume la ĝusta afero – kun botelo da Chablis, kaj poste kamemberto, ␣ ␣ s ␣ ␣ ␣ da kafo kaj cigaro.
2. Sur la maro staris granda trimasta ŝipo, nur unu velo estis levita, ĉar estis nenia bloveto, kaj inter la ␣ ␣ ␣ r ␣ g ␣ r ␣ sidis ĉie ŝipanoj.

3. Hodiaŭ Unikodo havas en unu sola kodo-spacon por la ␣ ␣ g ␣ ␣ r ␣ ␣ de ĉiuj homaj lingvoj – estintaj kaj estantaj.

4. Abundas komplikaj ␣ ␣ g ␣ ␣ ␣ r ␣ ␣ en la financa kaj komerca mondo, kiuj estas senprobleme respektataj.

5. Pluraj grupetoj ene en Esperantujo, pro libervola laboro sukcesas agadi, eldoni altnivelajn ␣ ␣ b ␣ ␣ ␣ ␣ ĵ ␣ ␣ ␣ sen pagitaj dungitoj.

6. La enkonsidero de la ekologiaj postuloj kaŭzos, ke poluantaj entreprenoj kiel cementejoj, ␣ ␣ t ␣ ␣ ␣ j ␣ ␣, ferfabrikoj ktp. devos altigi prezojn de siaj produktoj.

7. La inaŭgurata Esperanto-Domo intertempe surmetis ␣ l ␣ ␣ ␣ r ␣ ␣ kaj ĝardenistoj estis metintaj seĝojn antaŭ la Domon por la gravuloj, kadukuloj kaj kelkaj bonŝanculoj.

8. En demokratiaj socioj ĉiam ␣ ␣ ␣v␣ ␣ l ␣ ␣ perversaj "intelektuloj", kies malkontento pri iliaj registaroj esprimiĝas kiel simpatio kun komunismo aŭ io tia.

9. La stilo de la traduko estas vigla kaj bona, tre malofte ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ĉ ␣ ␣ d ␣.

10. La sistemon de vokala harmoniigo, kiu ekzistis tiutempe, la kreintoj de la skribo ␣ ␣ ␣ ␣ t ␣ g ␣ ␣ al la koncepto de opozicio de jino kaj jango.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

1. Ne iru eksteren sen ŝanĝi la vestojn – se nilono kunglaciiĝas kun la haŭto, ĝi iĝas nedisigebla kaj ___ amputadon de la koncerna korpoparto
   a. dancigas b. rezultigas c. progresas d. pikas
2. La libron sub la titolo *Inter vivo kaj morto* publikigis la eldonejo Edistudio: bone ___ libro kun fortika kovrilo kaj sur ĝi foto de bela, juna viro, kia iam estis la aŭtoro.
   a. presita b. hejtita c. evitita d. kombita
3. Ĉiumatene dezirantoj komune kuradis kaj ___ en la apuda artefarita lageto.
   a. obeis b. hontis c. naĝis d. plantis
4. La lernanto devas ___ la movon de la buŝo de la instruisto kaj senti per sia mano la vibradon de la gorĝo kaj poste meti la manon sur sian gorĝon, dirante la samon.
   a. bedaŭri b. pentri c. averti d. imiti
5. La programo estis tiom ___, ke iri eksteren tempo mankis – krom la tema programo oni vizitis kursojn, koncertojn, partoprenis lingvajn konkursojn, aŭskultis bardojn ks.
   a. densa b. volonta c. ebena d. taŭga
6. Kiam Usono decidis enkonduki embargon kontraŭ iu "malobeema" lando, ĝi devigis ___ aliajn landojn fari la samon pro solidareco.
   a. strangajn b. akrajn c. subitajn d. plurajn
7. Cetere: EU preskribas ___ sur cigaredskatoloj averton pri mortorisko, sed samtempe subvencias per mono el impostoj tabak-kultivadon, ĉu eblas agi pli absurde kaj cinike?
   a. balai b. presi c. blovi d. pafi
8. Laŭ ŝanĝiĝo de la ___ diversaj fiŝoj rondvojaĝas la japanan insularon, ekzemple en majo kacuono (speco de skombro) kaj en aŭtuno sairo.
   a. vundoj b. flagoj c. sezonoj d. bstonoj
9 En Leoben, dua granda urbo de sudaŭstria lando Stirio, estis organizita ampleksa ekspozicio "Egiptio – en la ___ de faraonoj".
   a. guto b. pasto c. vosto d. regno
10. Termino estas vorto aŭ esprimo speciala al iu ___, arto, metio, fako.
   a. scienco b. potenco c. cifero d. gaso